


TELESKOPA SISTEMO DE LA NEŬTRALECO

(La pli grandaj kvadratoj entenas la pli malgrandajn, la grado ~~grado~~ de neutraleco pligrandiĝas sur la nivelo de ĉiu kvadrato en la direkto de la individueco al ekologio.)



c ĝunt-a, AVE, 85/3

La adreso de d-ro Gunther, al kiu bonvolu skribi kun ĉiuj help-proponoj kaj ideoj pri nia budo kaj nia seminario en Aŭgsburgo, estas: Schulstrasse 7, D-3501 Ahnatal-Weimar, F.R.Germanio.

Limdato por novaĵoj, leteroj por Aveno 3: 1985-08-31. REKIKLIGATA PAPERU



A V E N O n°2

kvaronjara bulteno de la
Asocio de Verduloj Esperantistaj
Sekretario: Jean-Claude Thumerelle
Place de la Station 16, 7790 Warneton, Belgio

Redaktoro de "Aveno": Christopher Fettes
St Columba's College, Dublin 16, Irlando Resp.

Aprilo-Julio 1985

BEDAŬRESPRIMO

Dum vi paciencie atendis la duan numeron de Aveno, via redaktanto estis (kaj iom estas) dum multaj semajnoj malkapablita pro malagraba malsano; li fakte pasigis pli da tagoj en la lito dum tridek tagoj ol dum la antaŭaj tridek jaroj! Jen la kaŭzo de la longa prokrasto kiu, espereble, neniam ripetigos. (Kaj same pri la malsano!)

JARKUNVENO

Tiu ĉi okazos dum la UK en Aŭgsburgo, vendredon la 9an de aŭgusto en la ĉambro Grabowski, kaj estos sekvita de seminario pri Ekologio organizata far la nelacigebla d-ro Wolfgang Gunther, kiu lastatempe tradukis en Esperanton la libron Naturo kaj Socio de Edgar Guhde. La jarkunveno mem okazos je 09 00; ĉiuj kiuj havas ideojn pri la estonteco de nia organizaĵo estas urĝataj alveni akurate!

D-ro Gunther mendis budon en la kongresejo kaj ni kompreneble bezonas la helpon de kiel eble plej multaj helpantoj por informi la kongresanojn pri la graveco de niaj ideoj. Se do vi estos preta deĵori, rekte kontaktu lin. (Vidu p.8)



Lau ĝenerala konsento tio estis tre agrabla renkontiĝo, kun tre bona etoso, ĉiam haveblaj manĝaĵoj bongustaj, impona kongresejo (la mezepoka urbdomo), granda spaco por ekspozicioj (kompreneble uzita ankaŭ de nia asocio), kaj neniu el 600 personoj notinde ebria....

Malbona aspekto estis la troo da la angla lingvo; kompreneble la plej granda parto de la ĉeestantaro estis angleza, sed se la Verduloj vere pensas pri minoritatoj ili devas fari tion ankau dum siaj kongresoj; kaj ĝis la anglezuloj vere spertos la malagrablaĵojn de pertradukila aŭskultado ili neniam komprenos la nejustecon de tia sistemo. Notinda absurdaĵo estis la fakto ke ĉiuj el la ses ĉefaj parolantoj ĉe la plej grava kunveno parolis angleze, ec tiuj el Germanio.

El la plenĉambraj diskutoj la plej malsukcesa estis tiu pri (laŭ la programo) "Verda Ekonomiko". Tie la ĉefparolantoj - kaj eĉ la plejparto de parolantoj "surplankaj"-senĉese pri-diskutis plendungadon anstataŭ la bezonon liberigi homojn de nekreiva ŝvitlaboro, tio kio necesigos alian bazon ol salajron por ke ĉiu ricevu enspezon. Bedaŭrinde Rudolf Bahro, unu el la malmultaj membroj de Die Grünen kiuj pripensas tiun aferon, ne povis ĉeesti la kongreson.

Kaj pri Esperanto ? Nu, AVE havis grandan ekspozicion de libroj en la Internacia Lingvo kaj de libretoj pri ĝi en diversaj naciaj lingvoj; bedaŭrinde ne ĉiuj kongresanoj esploris ĝis nia angulo.... Ankaŭ ni aranĝis kunvenon de Esperantistoj, kiun ĉe-estis dekumo de samideanoj.

C.Fettes

Dovero laŭ virina vidpunkto

Post du agrablaj tagoj ĉe la 2a KEV mi lernis ke oni starigos nur-virinan renkontiĝon. Mi ĉeestis ĝin kaj lernis, surprizita, ke la plejmulto malŝatis la kongreson ĉar, laŭ iŝi, kvankam virinoj antaŭlaboradis kaj aranĝis la aferon, nur viroj donis la paroladojn - kaj ili ofte paroladis ege tro longe. Sveda virino diris ke, je Miljøpartiet, ĉio dividiĝas egale inter viroj kaj inoj; duono de la laboro, duono de la gloro.

(daurigata sur paĝo 5.)

Tiel frue kiel Junio 1970 okazis en Dublino publika prelego sub la titolo "Kial ni bezonas biopolitikon". Ĉu simbole ke baldaŭ poste la hotelo kie okazis la prelego forbrulis ?

Nur post dek unu jaroj tiu preleginto ekpensis starigi partion laŭ la modelo de la brita Ecology Party. Tiun ĉi ideon li proponis dum somera jarkunveno de la irlandaj "Teramikoj", kaj tiam dum pluraj monatoj kontaktis pensemajn homojn en organizaĵoj interesataj pri homaj rajtoj, bestaj rajtoj, la protektado de naturo, ktp. La rezulto estis fondkunveno en Decembro 1981.

En 1982 la politika situacio irlanda estis nestabila, kaj okazis du naciaj balotoj. Ni decidis partopreni la duan, sen ia ajn espero gajni parlamentan sidlokon, kaj eĉ sen la rajton havi la vortojn "Ecology Party" sur la balotslipo.

Nu, kiel ofte okazas kiam kunvenas pensemuloj, ni multe diskutis la signifon de "politiko ekologia" sen atingi precizan difinon; sed ĉiam ni celis la idealon, ĝenerala konsento. Pro tio ni decidis forigi la vorton "ekologio" de nia titolo, kiu multaj opiniis (ĉu prave?) tro "intelekta" por ordinaraj homoj, kaj la vorton "partio" ĉar ni volis montri nin kiel ion malsama ol tipa politika organizaĵo hierarkia. Pro tio ni prenis al ni la nomon "Comhaontas Glas - The Green Alliance" (t.e. la Verda Alianco); sed estis la gaela nomo kiu venis unue.

Je la momento de la baloto por la Eŭropa Parlamento ni estis ne bone organizita pro iom paranoja koterio (kiu nun feliĉe disiĝis). Malgraŭ tio nia sola kandidato ricevis pli ol kvin mil voĉdonojn, kaj tio estis la unua fojo kiam ni rajtis havi nian titolon sur la balotslipo.

Lastatempe okazis en Irlando Respublika baloto por lokaj konsilantoj, kaj ĉi-foje ni gajnis nian unuan sidlokon. Ĉu signife ke ĝi estas en Killarney, la plej turistema loko de la lando, kie estas grandaj problemoj pri malpurigado (parte kaŭzita, kompreneble, far turistoj!)?

C.Fettes

Ni gratulas nian membron en Kimrujo, s-ro David Davies, kiu gajnis 18.64% en lastatempa loka baloto.

ATENDANTE ALIAJN BHOPAL ...

La terura katastrofo, kiu okazis en Bhopal (Hindujo), evidente reliefigis la kondamnindan sintenon de la grandaj plurnaciaj kompanioj rilate la popolojn de la Tria Mondo. En tiuj landoj ili trovas tre malmultekostan manlaboron kaj, ĉar ili tute malestimas la lokajn enloĝantojn, ili povas uzi siajn fabrikojn ne prizorgante la minimumajn sekurecajn normojn. Unu homo ne valoras saman prezon en Washington ol en New Delhi ! Pro tio en la fabriko Union Carbide en Bhopal ne estis eĉ centono de la aparta arango pri sekureco, kiun oni trovas en iu ajn fabriko de Usono.

Sammaniere oni starigas sen aparta antaŭzorgo en la malriĉaj landoj poluciantajn, danĝerajn kaj malsalubrajn industriojn. Tie oni ankaŭ eksperimentas toksajn produktojn kaj detruajn armilojn, kaj stokas venenajn rubojn. Sekve la ekzisto, la postvivo kaj la kulturoj de la enlandaj komunumoj estas minacataj, la ekologia ekvilibro de tiuj regionoj estas detruataj kun kompreneble konsekvencoj en aliaj mondpartoj. La industriaj landoj kutimiĝis fari en la Tria Mondo, kion ili ne povas aŭ ne aŭdacas fari sur siaj propraj teritorioj.

La ekzemploj pri tio estas multegaj, sed jen nur kelkaj:

- Por faciligi la konstruon de baraĵo en orienta Amazonio, la usona kompanio Dow Chemical provis du novajn senfoliigajn produktojn. El tio rezultis ke pli ol 7000 indianoj mortis, du triboj malaperis, kaj la faŭno kaj la flaŭro suferis nereparablajn damaĝojn.

- Ankoraŭ en Brazilo, filio de Elf Aquitaine, franca petrola kompanio, detruis sur la teritorio de la indianoj Satere-Mawe kulturajn terojn kaj arbarojn, poluciis riverojn kaj tute perturbis la tradician vivon de la vilaĝoj (alporto de alkoholaĵoj, pornografaĵoj, k.t.p.).

- En Usono la indianoj Navajo ankaŭ multe suferis (k. suferas) pro la ekspluatado de ilia teritorio, en kiu bedaurinde estas uranio; sen la konsento de la enloĝantoj oni fosis subĉielajn minojn farante el kulturaj kaj bredaj teroj por ĉiam neuzablajn lokojn. Aliaparte oni laborigis la indianojn en la minoj sen neniu protektado kontraŭ la radioj.

- En Kebekio oni intencas elpuŝi el siaj teritorioj indianojn Montagnais pro baraĵkonstruado. La gazetaro ankaŭ skribis pri la dronado de 22 000 boacoj en norda Kebekio pro malfermo de kluzpordeto tiam, kiam tiuj bestoj trairis riveron.

La 13an de Oktobro 84, en Parizo, la indiano Gilbert Pilot klarigis ke, de 1980, la aerarmeo de okcidenta Germanio flugas je tre malalta altitudo super la indianaj regionoj okazigante por la homoj kaj la bestoj gravajn perturbojn.

Oni povas, bedaŭrinde, longe daŭrigi tiun liston pri la nerespekto de malriĉaj au malgrandaj popoloj. Sed tio ĉi montras precipe al ni la agadtereno de la ekolgiistoj estiĝis vere tutmonda, kaj ke konsekvence nia laboro estas grandega

J-Claude Thumerelle

(Tiu artikolo estas kompilaĵo de informoj publikigitaj en la franca monata revuo "Différences".)

Ankoraŭ pri la valo Houille

En la 1a numero de Aveno mi prezentis al la legantoj agadon iniciatitan de la belga movado Ecolo por savi minacatan valon fare baraĵkonstruado. Al tiu agado ĉiu povas partopreni aĉetante 1 m² de la minacata tereno kaj ĝis nun pluraj AVE-anoj el diversaj landoj estiĝis kunposedantoj de teropeco en Belgio. Entute Ecolo vendis jam pli ol 2500 m², sed ankoraŭ multaj estas aĉeteblaj: mi atendas viajn leterojn

J-Claude Thumerelle (adreso sur paĝo 1)

Dovero lau virina vidpunkto (daurigita de paĝo 2)

Mi ne povas nei ke iŝi pravis; nek unu ina parolanto troveblis en la programo; iuj el la aliaj certe tro daŭrigis siajn informojn. Kaj ili ne konsciis ke estas malagrabla auskulti longe per aŭskultiloj, kaj ankaŭ malagrabla aŭskulti sian propran lingvon uzaĉita de nedenaska parolanto.

Sed, fakte, mi restis sufiĉe kontenta. Oni vizitis la AVEan ekspozicion; poresperantista renkontiĝo malkovris iujn verdulojn kiuj jam dum jaroj parolis la Internacian Lingvon; ŝajne du membroj de la Eŭropa Parlamento estas pretaj proponi rezolucion por kuraĝigi la tiean lernadon de Esperanto; kaj, finfine, Fritjof Capra parolis nur dek kvar minutojn kaj duonon, kaj transdonis preskaŭ la tutan enhavon de sia libro The Turning Point. Eĉ virino ne povus plu.

Maire Mullarney

EKOLOGISMO KAJ DEMOGRAFIO DE LA MONDO.

Tra la mondo kelkaj popoloj vidas malpliigi iliaj loĝantaroj aŭ ne sufiĉe kreski, laŭ la diroj de famaj demografistoj. Dumtempe kelkaj aliaj popoloj duobligos dum la dudek lastaj jaroj de finonta jarmino. Tiuj popolojn oni laŭdas kiel junaj, kaj la malpliigontajn oni kvalifas kiel maljunaj. En la maljunaj landoj oni timas ĉu oni povos ĉiam pagi pensiojn al emeritigotoj; oni preskaŭ sindemandas se oni ne devos mortigi ilin anstataŭ ruinigi la venontajn generaciojn.

Sed kiuj popoloj estas junulaj, kaj kiuj estas la maljunulaj? La grafiko de kreskantaj nacioj montras ke ili estas ĉiu mandĉinaj landoj aŭ aziaj religiaj landoj. Ĉinio, kiu havas tamen ankoraŭ kelkajn problemojn, sed ne religion, serĉas sian propran solvon.

Ĉu oni devas envii popolojn ĉe kiuj maljunuloj ne povas vivi en la vivkondiĉoj estas tro malbonaj, ĉe kiuj oni kunvivas same kiel dum mezepoko, kiam oni devis naski dek aŭ dekdu infanojn por povi konservi unu aŭ du vivontajn plenkreskulojn... kaj tiuj ne vivis plie ol tridekkvin aŭ kvardek jaroj. Depost industria revolucio, kaj samtempaj kuracaj progresoj, dum dua duono de 20a jarcento, oni havas demografian eksplodon. La petrolkrizo konigis nin ke ĉiuj bezonrimoj ne kreskas, sed male malpliigas, kaj se dumtempe la postulontoj pliigas, oni ne povos trovi alian solvon ol milito aŭ pesto...

Mi pensas ke tio estus bona problemo por diskuti en verda medio! Kion vi pensas pri tio?

Paŭlo Touron

ĈARTO DE PACO
de la Orient-Okcidentaj Pacanoj

1. Ni, homoj de la Oriento kaj la Okcidento, volas vivi en amikeco kaj paco. Ĉiaj diferencoj inter ni estas decideblaj per negocio. Militaj rimedoj estas malproduktivaj.
2. La linio kiu dividas Eŭropon estas la granda divido inter la Oriento kaj la Okcidento. En la landoj de NATO kaj la Varsovia Pakto nia komuna respondeco al la paco restas.
3. La rezigno de la milito farita de la popoloj de ambaŭ flankoj estos nova kaj revolucia iniciato por la paco.
4. Vivi en paco estas fundamenta rajto. Ni akceptas la respondecon sekurigi ĝin por aliaj same kiel por ni mem.
5. La aŭtoritato venas fine ne de registraroj sed de homoj. Ni, la homoj de ambaŭ flankoj, povas per kunlaboro rompi la nunan senlirejon inter registraroj. Ni amikigos tiujn kiujn oni misprezentas kiel malamikojn.
6. Ni volas plenan nuklean kaj konvencian malarmadon en etapoj bilancitaj sen doni militajn avantaĝojn al ia partio.
7. Nune la Orientaj kaj Okcidentaj potencoj eksportas siajn konfliktojn kaj armojn al la Tria Mondo. Orient-Okcidenta paco permesos al ĉiuj popoloj unuigi por helpi la Trian Mondon solvi siajn problemojn.
8. Ni rifuzas la ideon ke ni ĉiam havos militojn. Ni deklaras Orient-Okcidentan pacon.

(La kunordiganto de la Orient-Okcidentaj Pacanoj - The East-West Peace People - estas Peter Cadogan, 1 Hampstead Hill Gardens, London NW3, Anglujo.)

Pri Acida Pluvo Tiu ĉi problemego maltrankviligas publikon kaj registrarojn je monda skalo. Multaj lagoj kaj riveroj havas acidajn akvojn; ekzemple en Norvegio oni konstatis ke el 5000 lagoj 1250 perdis la fiŝojn kaj ke aliaj 900 estas serioze domagigitaj; kaj la acida pluvo estas rekonata kiel unu el la ĉefaj kaŭzoj de la difektiĝo de preskaŭ miliono da hektaroj de arbaroj en centra Eŭropo.

Aldo Conti